# Informilo

**Monata revuo**
**Maandelijks tijdschrift**

**10a jarkolekto n-ro 4**
**majo 1990**



Estraro:
Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

Komisiitoj:
Financoj: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
Eldonoj: Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen).
Manlibro de la aktivulo: Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12, 3030, Heverlee, tlf. (016) 20 14 53).
Gazetara servo: Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, tlf. (03) 234 34 00).
Rebata servo: Germain Pirlot.
Prelegvojaĝoj: Hilde van Ingelgem (Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11).

Oficejo:
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Malferma principe ĉiun labortagon de 9.00 ĝis 12.30 h. kaj de 13.30 ĝis 17.30 h. Telefono (03) 234 34 00. Telekopiilo: (03) 233 54 33.

## ENKETO ĈE LA GRUPOJ.

Dum kaj post la jarkunsido ni enketis ĉe la klubrespondeculoj pri la agado de la pasinta kaj pri la kuranta jaroj. Estas iom malfacile por malkovri tendencojn el 11 respondoj. Tamen kelkaj konkludoj fareblas.
1. La plej alarmiga estas la respondo je la unua demando: 6 el 11 opinias sian agadon seniluziiga. La repondo al tiu demando influas la ceteron de la enketo: la seniluziigitoj konstatas malinteresiĝon de la publiko, spertas pli da konkurenco, ne havas planojn por la estonto, dum tiuj, kiuj opinias sian agadon sukcesa jes spertas pli da eĥo.
2. Efektive en la dua demando 5 parolas pri malinsteresiĝo pri Esperanto, 1 pri konstanta eĥo kaj 5 pri kresko.
3. Surpriza estis la prefero por informagado ĉe studentoj kaj junuloj (7).
4. Nia ĉefa konkuranto estas komprenebie la televizio (4). Poste sekvas aliaj ŝatokupoj kaj aliaj lingvoj (po 3).
5. Apenaŭ fareblas konkludo pri mankoj en FEL, nek pri proponoj por nova agado. Cetere el la demandoj pri novaj planoj montriĝis neniu nova ideo, escepte de la surstrata enketado en Gent. La kluboj preferas daŭrigi sian tradician agadon.
6. Se la kluboj ne faris multajn sugestojn, la estraro de FEL tamen devas reagi precipe al la senilizuiĝo de kelkaj klubgvidantoj. FEL nun nepre kaj urĝe devas krei pli da bruo pri Esperanto por subteni la lokajn agadojn! Samtempe ni petas la kunlaboron de lokaj grupoj por sukcesigi tion.
Unua paŝo jam fariĝis. Pieter Vets kreis en la centro tre profesian varbleteron por la kurso Esperanto-Programita. Unua provo fariĝis en majo, kiam oni forsendis 400 varbleterojn. En la someraj monatoj, ni intencas dissendi milojn da leteroj. VI POVAS KONTRIBUI EN TIO PER LA KOLEKTADO DE ADRESLISTOJ ĈE AMIKAJ ORGANIZAJOJ. Se tio eblas, bonvolu informi la centron baldaŭ pri la nombro da adresoj, kiujn vi povus liveri kun kiel eble plej detala priskribo de la grupo: Pieter Vets faros adaptitan leteron laŭ la celgrupo.
Dua paŝo estas la aldono de loka elemento al la gazetaraj komunikoj. En Germanio oni spertis dekobligon de aperintaj gazetkomunikoj, kiam oni komencis mencii la lokajn partoprenantojn en internaciaj aranĝoj kaj kiam oni sendis tiujn komunikojn al lokaj raportistoj de la gazetaro. Tial ni denove petas vian kunlaboron. SE EN VIA KLUBO IU PARTOPRENOS EN LA UK EN HAVANO, VI BONVOLU SENDI AL LA CENTRO LA NOM- KAJ ADRESLISTON DE LOKAJ GAZETAJ (kaj RADIAJ) RAPORTISTOJ. VI ANKAŬ MENCIU ĈU VIA PARTOPRENONTO KONSENTAS KE NI MENCIU LA NOMON EN GAZETKOMUNIKO. Dum la kongreso, iu verkos artikolon en Havano, espereble eĉ plurfoje en la kongresa semajno, kun la plej freŝaj novajoj kaj telefaksos ĝin al Antwerpen. Tie oni faros perkomputeran leteron kaj aldonos lokan elementon, kiel ekz. "Jos Vande Bergh uit Houthalen rapporteert ons uit Cuba.... " of "Drie deelnemers van onze plaatselijke Esperanto-club in Kalmthout beleefden in Cuba...." kaj rekte dissendos aŭ faksos ĝin al la donitaj adresoj. Tiamaniere la gazetoj ricevos plej freŝajn kaj allogajn novajojn.
Ni tre esperas ke tiuj du iniciatoj iom plifortigos la agadon de la lokaj kluboj. Aliaj sugestoj restas bonvenaj.

**Ĝenerala jarkunveno de FLEJA je sabato 10a de marto 1990 en la Esperantocentro en Antverpeno**

Komenco: 10h15.

TAGORDO

1. Enkonduko :
Gvidanto : Patrick Haerick.
Protokolanto : Jean Pierre VandenDaele.

2. Statutoŝanĝoj :
- artikolo 4: pro akceptiĝo de limaĝo ĝis 30 jaroj ĝi adaptiĝu: "... de leeftijd van 30 jaar ... "
- artikolo 16: la mencio "vóór 1 april" forfalu por ebligi ĝeneralan jarkunvenon dum nia semajnfino

3. Jarraporto de 1989 :
4/3: kursotago en Kortrijk (kiu malsukcesis)
23-27/7: bicikla karavano de Kerkrade al Oostende: sukceso
3/9: zonumo: agrabla kaj ripetinda
13-15/10: 12a semajnfino en Lokeren: malgraŭ la malgranda nombro da partoprenantoj ĝi tamen estis internacia kaj bona.

4. Financoj (Eddy):
4.1: 12a semajnfino:
pro senaverta ŝanĝiĝo de la kondiĉoj subvenciaj (ekde nun nur por trejnado kleriga) ni ne ricevis subvencion de la flandra komunumo. Tial, kaj pro la malpli granda nombro da partoprenintoj ni havas malgajnan rezulton de 11500 frankoj.

4.2: financa raporto:
Eddy ne sukcesis fini ĝin tamen denove ni konstatis malgajnon. Pro la fakto ke ni ne havas tute klaran superrigardon pri la elspezoj Eddy, An kaj Patrick detale esploros ilin dum sekvonta sabato akceptcele dum sekvonta kunsido.
Gravaj elspezoj ankaŭ estas JEN (preskostoj: preskaŭ 22000 frankoj) kaj Koncize (preskostoj: iom pli ol 5000 frankoj). Por redukti ĉi lastan koston Jean Pierre petos por malgrandigi la ekspedkvanton de 50 al 40 ekzempleroj.
Neantaŭvidite pozitiva estis ke la partopreno en la Gambrinus-festoj en Loveno alportas gajnon de 7000 frankoj.
Fine Eddy zorgos ke la mono sur la kuranta konto de UEA estos transigita al la ŝparkonto de UEA.

5. Elektoj :
Pro manko de novaj homoj la estraro restas kiel ĝi estis la antaŭan jaron. Prezidanto: André, vicprezidanto: Patrick (lasta jaro!), sekretario kaj FEL-administranto: Jean Pierre (lasta jaro!), kasisto: Eddy, redaktoro JEN/Koncize: Stefaan, taskitoj: An, Carl kaj Vera. TEJO-komitatanoj (ĝis 1992) restas André kaj Ilse. Se Carl partoprenos en la IJK en Kubo li petos al Ilse anstataŭigan deklaron. Pli kaj pli necesas trovi novajn junajn kandidatojn por eniri la estraron.

6. Revuoj :
Ĉar evidentiĝas ke la kostoj superas la enspezoj kotizaj ni decidis altigi la kotizon ek de 1991 al 200 frankoj por JEN kaj 250 frankoj por Koncize.
Ni ne tro entuziasme kredas en la realigo de anoncoj en JEN;

ankaŭ ne tute klaras kiaspeca reklamo akcepti kaj ĉu tio signifas ke restos malpli da paĝoj por artikoloj. André atentigos pri la (mal)avantaĝoj dum la NEJ-jarkunveno kaj esprimos nian sintenon.

7. Estontaj planoj por 1990 :

24-27/5: principe ni denove partoprenos la Gambrinus-festojn en Loveno

2/9 : denove ni zonumos, ĉi-foje kun la eblecoj promeni aŭ bicikli. Eddy rezervos kiel antaŭa jaro por 10 partoprenontoj.

Komuna kursotago en Bruselo fine de septembro: André proponas ke Emile van Damme instruos ĉar li scipovas la nederlandan kaj francan. Sed ni ne jam scias ĉu JEVA ankoraŭ volas okazigi ĝin. La kursosemajnfino en Hastière-Lavaux tre verŝajne ne okazos pro manko de aliĝintoj.

2-4/11 : belga aŭtuna semajnfino:
ni esperas ricevi pli da informoj pri ĝi post la ĝenerala kunveno de JEVA kiu okazos la 24an de marto en Mons. Tiel ke ni povos decidi pri (financa) helpo prefere dum paska kunveno en Nederlando. Nuna situacio estas tiel ke sole Jean-Christophe Somer faras la preparan laboron. Ni konstatis ke la junulargastejo en Eupen jam estas opciita por 80 personoj kun la risko de monoperdo se malpli da aliĝintoj estos kaj ke la aliĝkotizoj estas tro altaj.
Alia ebleco estas la muelejo de Hermeton en Hastière-Lavaux kie eblos mem kuiri kaj vendi trinkaĵojn. Ni mem povos zorgi por kuira teamo. Se tiu ĉi semajnfino ne okazos tio signifos ke ĉijare ni ne havos junularan renkontiĝon ĉar jam tro malfruas rezervi ejon ĉi tie en Flandrio.

8. Diversaĵoj :

Subvencio IJF-Bolzano: André petis la specialan formularon kiu ebligas havi individuan vojaĝsubvencion (kun maksimumo de 8000 frankoj). Ni decidis ke FLEJA tenas de tiu ricevota sumo 1000 frankojn kaj pagos la reston al la vojaĝontoj. An kaj Peter Ameye interesiĝas partopreni ĉi tiun renkontiĝon.

Pasporta Servo (informiloj): neniu novaĵo, ni esperos havi pli da informoj dum jarkunveno de NEJ

Interŝanĝo kun poloj: intertempe denove okazis vizitoj de flandroj al Pollando tiel ke denove poloj povos veni ĉi tien. Ĉar ne estas tute klara pri kiom da restadtagoj temas André petos al Iwona pri la nuna stato.

Insignoj:
perdiĝis pli ol 500 glimoj insignaj dum lasta pruntedono. Vane Jean Pierre provis aparte mendi ilin sed post telefona interkonsento kun Derk Ederveen la kosto estas limigita (pro subtraheblеco de AVI) al 3150 BEF de kiu ni mem devas pagi ĉ. 1300 BEF.

Sekvonta estrarkunsido okazos antaŭ la serĉpromenado en Gento la 2an de junio ĉe Patrick. Neformalajn kunvenojn ni havos dum NEJ-kunveno en Nederlando kaj promena tago en Oostende.

Fino: 12h30.

Uzitaj mallongigoj

| | |
|---|---|
| FLEJA | Flandra Esperanta Junulara Asocio |
| IJK | Internacia Junulara Kongreso |
| JEN | Jongeren Esperanto-Nieuws |
| JEVA | Junalara Esperantista Valona Asocio |
| NEJ | Nederlanda Esperanta Junularo |
| TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo |

PROTOKOLO PRI LA ESTRARKUNVENO DE FEL DE 900511

1. Ĉeestas: Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR), Alex Humet (AH) kaj Paul Peeraerts (PP).

2. Eldona agado: Eldoniĝis "Internacie kuiri". Estas nun preparata "Grammaire ABC d'Espéranto". Poste tuj sekvos "La fundamento sub lupeo", "La akuzativo en Esperanto" kaj "1887 kaj la sekvo". Ankoraŭ atendas prilaboradon la historia libro kaj nova romano de Deck Dorval. Survoja, sed ne por baldaŭa estonteco, estas politika terminaro/vortaro. Planata estas ankaŭ poemaro de Emile van Damme kaj "Gramatika ABC de Esperanto".
Principe la estraro aprobas la eldonon de novelaro konsistanta el verkoj jam aperintaj en "Monato".
En la serio Esperanto-dokumentoj baldaŭ pretos "De psychologische reacties op het Esperanto".
Entute do dek verkoj atendas publikigon.
PP Oni rekomendas al PP serĉi kroman teknikan redaktoron kaj kroman juĝanton de manuskriptoj por senŝarĝigi la nunajn homojn.

3. Malmola disko por Stefan Maul: La estraro konsentas repagi al Stefan Maul duonon de la aĉetprezo de malmola disko kiun li uzas i.a. por "Monato" kaj por la redaktado/kompostado de la politika
PP terminaro. PP informos lin.

4. Batos: Post longa interparolo la estraro decidas kunlabori kun la komunumo Houthalen-Helchteren pri la evoluhelpa projekto "Batos". Aparta bankkonto jam estas malfermita en kiu la donacoj por Rumanio povas esti pagataj.

5. Kunlaboro kun Hungario: MC skribos al Margit Evva por kontraŭproponi oferton en forintoj. FEL havu bonhavon en Hungario
MC en forintoj, kaj ne en alia valuto.

6. Kunlaboro kun GDR: La estraro rajtigas al PP jam komerce traktadi kun GDR, kvazaŭ ĝi jam nun estus transpagipova lando. La ŝuldoj estu pagitaj nur kiam la okcident-Germana marko
PP estos iĝinta oficiala valuto de GDR.

7. Protokolo de 900310: akceptita.

8. BEF-kunsido: ID raportas pri ĝi. APE proponas ke la APE-membroj en BEF estu aŭtomate administrantoj de Sonorilo, por havi pli da influo sur tiu ĉi organizaĵo. Gajno de la BEF-fondaĵoj: ĉirkaŭ 19000 iros de BEF al EEC kiel kontribuo de BEF. La cetero iros duone al APE, duone al FEL.

9. Taskodivido: La taskoj en la estraro 1990-1991 estas dividitaj kaj renomumitaj la komisiitoj. Vidu liston sur paĝo 1 de tiu ĉi revueto.

10. Organigramo: ID petos la detalojn al la diversaj grupoj kaj komunikos la rezulton al la centro. Aldoniĝu Edward Symoens al la
ID honora komitato.

11. Enketo ĉe la grupoj: vidu aldonaĵon.

12. Leterado: Pieter Vets, la militrifuzanto, preparis leteron kiu estis sendita al 300o da iamaj informpetintoj pri Esperanto. La celo estas vendi kursojn kaj reatingi la homojn. Post la somero li sendos ĝin, eventuale post adaptoj, pli amase al

PV la membroj de amikaj organizaĵoj, laŭ la kriterioj de nia celgrupo. La estraro opinias la leteron enhave bona sed iom senkolora.

13. Seruro: Baldaŭ venos nova seruro ĉe la enirpordo de la centro. Homoj kiuj konas la ĉifron povos dum difinitaj horoj eniri. Per la malnovaj ŝlosiloj ne plu eblos enveni. Malgranda kvanto da homoj posedos novan ŝlosilon per kiu eblos malfermi la pordon okaze de iu elektra paneo.

14. Gazetara dokumentujo: Pieter Vets konsistigis ĝin. La estraro opinias ke la kovrilo estas tro malluksa kaj komisias al PP

PP kalkuli la kostojn de pli luksa eldono.

15. Faldfolio Green: Kuŝas daŭre nepritraktate ĉe PP.

16. Eŭropa kongreso: devus okazi la 17an, 18an, 19an kaj 20an de majo 1991 en Bruselo. Promesis partopreni UFE, APE kaj FEL. Nur FEL prizorgos la librobudon kaj donos 10-elcentan makleraĵon al la kongresa kaso.

17. Konferenco de Esperanto-centroj: ne okazis.

18. Naturborso: Decidiĝas ankaŭ ĉi-jare ne partopreni.

19. Venontaj kunsidoj: 9 junio, 8 septembro, 13 oktobro, 10 novembro, 8 decembro.

20. Revuo Esperanto: Momente la kotizo estas 400 frankoj (same ĉe FEL kiel ĉe APE). Tiu sumo tamen ne plu kovras la kostojn, kiuj estas la jenaj:

| | |
|---|---|
| Pago al UEA: | 328 |
| Pago al impostoj: | 23 |
| Pago al la grupoj: | 35 |
| Afranko: | 44 |
| Transporto Rdam-Antv.: | ĉ. 44 |
| Faldado ktp.: | ĉ. 11 |
| Admonado eventuale | p.m. |
| Entute: | ĉ. 485 |

Ne jam estas konate ĉu tiuj sumoj altiĝos por 1991. La estraro petos al APE altigi sian tarifon ĝis 500 fr. kaj proponos al la FEL-membroj same.

## BELGA ESPERANTO-FEDERACIO.

1. Nova sekretario: Philippe Van Damme, 21 rue du Brillant, 1170 Brussel - tel.: 02/673 75 96 transprenis la taskon de Ivo Durwael kiel sekretario de BEF.
2. Kolizio de aktivecoj: Ĉar tro ofte diversaj aktivecoj kolizias, Philippe pretas fari liston de ĉiuj PLANITAJ aktivecoj en Belgio kaj en najbaraj landoj. Tial ni insiste petas, ke ĉiu, kiu PENSAS PRI aktiveco kaj volas varbi partoprenantoj ekster la propra klubo, komuniku tion al Philippe ANTAŬ OL FIKSI DEFINITIVAN DATON. Philippe tuj informos pri eventualaj kolizioj. Kelkfoje en la jaro li ankaŭ publikigos liston kaj dissendos ĝin al ĉiuj Esperanto-asocioj (FEL, APE, BEFA, SAT, ....).